

INTERKONSENTA kontrakto

farita inter (nomo) :
en (kompleta adreso/ŝtato) :

ĉi-poste nomita "la Artisto" (Nomo de la artisto),

unuflanke,

kaj (Nomo kaj kompleta adreso de la eldonejo)

ĉi-poste nomita "la eldonanto", aliflanke rilate la muzikverkon titolitan:

« *Nomo de la titolo* »

ĉi-poste nomitan "la eldonota verko" kiun la artisto rajtigas al « Nomo de la eldonejo » aldoni al ĝia « Titolo de la produktaĵo »

La du partioj interkonsentis jene:

La artisto rajtigas al la eldonanto inkluzivi la muzikpecon "Titolo de la muzikverko" en la « titolo de la produktaĵo ».

Estos menciite klare, ke la muzikpeco estas parto de la kompakta disko titolita "Nomo de la titolo de la albumo"

kaj eldonita ĉe « nomo de la origina eldonejo ».

La eldonanto pagos ĉiujn kostojn de la publikigo kaj reklamado de la eldonota verko. Ĝi fiksos la prezon kaj la vendokondiĉojn laŭ la establitaj kutimoj en la libromarkato, kaj mem decidus pri la nombro da senpagaj ekzempleroj destinitaj por recenzoj, bibliotekoj kaj aliaj instancoj.

La aŭtoraj rajtoj de la eldonota verko apartenas al la artisto.

La eldonrajtoj de « Titolo de la produktaĵo » inkluzive la rajton de mekanika, optika, komputila aŭ kiu ajn alia metodo de reprodukto, apartenas al la eldonanto.

« Titolo de la produktaĵo » estos eldonita enekzempleroj. La eldonanto havas la rajton eldoni kiom ajn da kromaj ekzempleroj laŭ bezone.

Se aparta interkonsento ne estas farita, la eldonejo devontigas sin pagi ĉiujare al la artisto por ĉiu vendita ekzemplero de « Titolo de la produktaĵo » laŭ la stato de la vendoj je la 31a de decembro. La pago por la koncerna jaro estu farita plej malfrue duonjaron poste. La pago okazu al :

(Tiotolo kaj datumoj de la bankkonto aŭ UEA konto de la artisto)

La artisto ricevos tuj post la publikigo 3 ekzemplerojn de la verko senpage, kaj rajtas aĉeti pliajn ekzemplerojn laŭ la plej favoraj kondiĉoj donataj de la eldonanto al la librovendistoj.

En okazo de kia ajn disputo en ligo kun tiu ĉi interkonsento, la disputita demando estos transdonita al tri arbitraciantoj por decido. Ĉiu el la du partioj elektos unu arbitracianton, kaj la du tiel elektitaj interkonsentos pri la tria arbitracianto. La partioj devontigas sin plenumi la arbitracian decidon.

Farita en, laan de 20.....

La artisto

La eldonejo